

# VERDA INFORMILO, n-ro. 5/2026, 20-a de aprilo 2026

## GRÜNER BOTE, 5/2026, 20. April 2026

estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio Meklenburgio-  
Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo  
Neubrandenburg (ESN)

ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und EVN  
[www.esperanto-nb.de](http://www.esperanto-nb.de), [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)

### Aprila kunveno 2026

Pro organizaj kialoj la loko de la kunveno devis esti ŝanĝata por la aranĝo je la 15-a de aprilo 2026. Ni gastis hejme ĉe familio Pfennig. Dankegon, karaj. Ĉeestis 7 personoj, el kiuj 4 prelegis pri diversaj temoj.

- Katoŝercoj (EH)
- pri katoj (WP)
- pri Luminesk' en Bingen (EH)
- iom da poezio (EH)
- kanto „barkarolo en vespero“ (MB)
- kanto „Mitsu mitsu mitsu“ (MB)
- memverkitaj kaj tradukitaj poemoj, plejparte el 1993 (RP)
- paĝaro de ESN, Schwerin kaj GEA (RP)
- pri p-ro Falkenhahn (WP)
- prezento de prelego de p-ro Falkenhahn el nia societa paĝaro (RP)
- daŭrigo pri „en la olda suno“ (MB)

Jen kelkaj fotoj



Vernereto, Edeltraut kaj Reneo



Vernereto, Edeltraut, Reneo, Birgit, Bernd,  
Margarete



Vernereto, Edeltraut, Reneo, Birgit kaj  
Margarete



Edeltraut, Reneo, Birgit, Bernd kaj Margarete

## Estontaj kunvenoj

- Kortofesto en Nechlin okazos la 19-an de aŭgusto 2026.
- Ĝardenfesto en Pragsdorf okazos la 9-an de septembro 2026.

## Grava atentigo pri la 1-a de majo

Bonvolu atenti, ke la loko por la informstano ŝanĝiĝis. Germane estas sufiĉe longa difino, nome „am Strandbad Broda auf der Wiese neben dem Beachvolleyballplatz“. RP tradukus jene: „je la ‚Strandbad Broda‘ sur la herbejo, apud la plaĝovolejbalejo“. Plibonigo estas bonvena, se eblas.

## Lingva angulo

Jen kelkaj iel rilataj vortoj, laŭ Reta Vortaro kaj Prevo:

- **knufli**: „Amike kaj tenere **karesi** per brusto, kapo, brakoj“
- **kuŝli**: „Intime, ĝue kaj delikate premiĝi unu al la alia dum iom longa daŭro, eventuale karesante sin“
- **ĉirkaŭbraki**: „Ĉirkaŭigi per ambaŭ brakoj, plejofte kun samtempa amema premo al la ĉirkaŭigata objekto aŭ persono“ (ankaŭ konata en PIV)
- **teneri**: „Konduti tenere“

Kiel traduki „Schrott“?

- **ferrubo**: „**rubo** konsistanta precipe el **feraĵoj**“ (laŭ Reta Vortaro kaj Prevo)

Jen komputikaj terminoj:

- **ŝprucfenestro**: „Tiu **fenestro** de komputila **ekrano**, kiu subite aperas, plej ofte neatendite kaj kun reklamo, parte kovranta aliajn fenestrojn“ (laŭ Reta Vortaro kaj Prevo)
- **ŝpruchelpilo** (laŭ Komputeko) kaj kun difino „eta ŝprucfenestro, kiu prezentas helpajn informojn rilate iu parto de interfaci“, (en testa PIV) – RIM: Ĉi tiun terminon uzas RP en nia paĝaro, ĉefe en la teknika parto.

## Interesaj ligiloj

Jen io pri teknika ruzaĵo por Esperanto:

- [Google Gemini por Esperanto-kurso](#) (el Ŝlesvig-Holstinio)

Jen pri fakaj terminoj:

- [Komputeko](#) – kolekto de terminoj pri komputiko

Jen pri internacia kunlaboro:

- [E@I](#) - „internacia junulara organizo, kiu subtenas internacian kunlaboron kaj komunikadon en la tuta mondo“

# Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.  
[tlustulimu@web.de](mailto:tlustulimu@web.de) (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse:  
[rene\\_philipp\\_ntz@gmx.de](mailto:rene_philipp_ntz@gmx.de)!)

## Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV

André Weber

Retpoŝto: [ACW.Esperanto@mailbox.org](mailto:ACW.Esperanto@mailbox.org)

Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,  
Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC:  
NOLADE21NBS

Esperanto-Verein Neubrandenburg (EVN)

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705

Tel. 0395 422 13 98

e.-Brief: [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)